

La mezuro de la homoj kaj de la ajoj
estas ilia propra ombro.

Titu MAIORESCU

BAZARO

Esperantlingva revuo
Cluj-Napoca, Jaro I, Numero 3
1997, Vintro

ABONO !

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por Rumanianoj estas 2000 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por KOLOZSVÁRI Zsolt aŭ

C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA SIGMOND Júlia

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

ALVOKO !

BAZARO intencas aperigi la liston de Rumaniaj geesperantistoj jam komence de 1998, tiucele bonvolu sendi urĝe viajn datumojn ĝis la fino de 1997, ĉar alikaze pro manko de sufiĉaj datumoj ni ne povas aperigi ĝin.

Personoj enlistigotaj havos neniun devon, ekzemple gastigi aliajn esperantistojn, loĝigi aŭ helpi ilin. Tiu listo servos nur kiel adresaro kaj dokumento pri la nombro kaj loĝloko de geesperantistoj en Rumanio.

Tiusence mi petas vin fotokopii la jenan formularon, disdonu ĝin inter la geesperantistoj de via klubo aŭ urbo kaj plenigite resendu al ni. Vi povas nur simple skribi sur blanka papero la datumojn petatajn de la formularo kaj sendi ĝin al la redakcio.

Familia nomo:

Persona nomo:

Naskiĝdato:

Sekso: vira/vrina

Adreso:

Urbo/vilaĝo:

Poŝtkodo:

Telefono:

Profesio:

Laŭdezire vi povas malplenigi unu aŭ pli da rubrikoj, pri kiu vi opinias, ke ĝi restu "sekreto".

Bildkart-ekspozicio pri la plej belaj preĝejoj de la mondo organizas 'SIGMOND Júlia, 3400 Cluj-Napoca, C.P.200.

BONVOLU KONTRIBUI! (eble pruntedoni)

Redakcio:

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111 RUMANIO

Eldonas:

Eldonejo DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
RUMANIO kaj
MUNICIPALA KULTURDOMO
P-ta Unirii n-ro 24
RO-3400, Cluj-Napoca, RUMANIO

Redakcia komitato:

Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia,
KOLOZSVÁRI Zsolt

Aperas: kvaronjare

Redactia:

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111 ROMÂNIA

Editata de:

Editura DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
ROMÂNIA si
CASA MUNICIPALA de CULTURA
P-ta Unirii nr. 24
RO-3400, Cluj-Napoca, ROMÂNIA

Comisia de redactie:

Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia,
KOLOZSVÁRI Zsolt

Apare: trimestrial.

LA ABIO

O, Tannenbaum, ho kara arb'
 Folie ĉiam verda,
 Vi verdas ne nur en somer'
 Sed ankaŭ vintre sub neĝer'
 O, Tannenbaum, ho kara arb'
 Folie ĉiam verda.

O, Tannenbaum, ho kara arb'
 Elkore mi vin amas!
 Multfoje vi, dum vintra fest'

Ĝojigis min en hejma nest',
 O, Tannenbaum, ho kara arb',
 Elkore mi vin amas!

O, Tannenbaum, ho kara arb',
 De mi vi povas lerni.
 Espere al konstanta cel'
 Alportas fortojn de ĉiel'.
 O, Tannenbaum, ho kara arb'
 De vi mi povas lerni.

EL CURS ELEMENTAR DE ESPERANTO de Ignat Florian
 BOCIORT kaj Mioara Lacrima DOBRE.

Karaj legantoj!

Jen la 3-an numeron de BAZARO vi jam tenas en via mano! Do, kune kun la provnumero ni sukcesis realigi nian planon, eldoni kvar numerojn en ĉi-tiu jaro. Ni kredas, ke nia revuo plenigas mankon en la enlanda E-movado, estiĝante regule aperanta E-revuo en Rumanio. Bedaŭrinde ĝi atingas nur iom pli ol cent geesperantistoj el Rumanio, kaj kelkdekon da eksterlandaj, sed ni esperas je kresko de nia legantaro dum la venonta jaro.

Ĉar proksimiĝas la 14-a de decembro, kiam ni festos la 138-an datrevenon de la naskiĝo de ZAMENHOF kaj la Tagon de E-Libro, ni petas vin, ke ĉiu en sia urbo/vilaĝo, faru ion por la memoro de la kreanto de Internacia Lingvo, kaj diskonigu Esperanton.

Al ĉiuj legantoj SERENAN KRISTNASKON kaj FELICAN NOVAN JARON deziras, en la nomo de la redakcio,

KOLOZSVARI Zsolt

PER ESPERANTO NI PLI BONE KONU NIAN LANDON

La serio de ekskursoj per tia temo komenciĝis en aprilo 1996 al belaj kaj historiaj lokoj de najbaraj distriktoj.

Fine de ĉi-jara septembro - 27-a - Esperanto Asocio Oradea organizis la trian senpagan ekskurson, ebligante al ĝiaj membroj tagon pasigi en agrabla medio de Esperanto, meze de la naturo.

Je la oka horo aŭtobuso kun 26 kuraĝuloj startis, celante PADUREA NEAGRA (Nigra Arbaro) fame konata pri valoraj vitraj varoj fabrikitaj tie, pri

ripozloko por lernantoj, vera pitoreskejo, precipe pri sovaĝaj belecoj de la naturo. Mi diris kuraĝuloj, ĉar parto de geamikoj ne partoprenis, ŝajne al nuba ĉielo, kiu frumatene malheligis, timigis ilin pro pluvo.

34 kilometrojn for de Oradea, ni haltis horon por viziti la urbon ALESD. Centre de ĝi troviĝas impona monumento, kiu atestas la sangribelojn de la kamparanoj en 1904.

Post aliaj 15 km. ni forlasis la ŝoseon kaj la lastaj pli ol 10 km, sur la modernigita serpentuma vojo nia veturilo suprenirante daŭrigis la ruladon tra arbaro.

La vojo tie estas mirinda, ambaŭ parte flankitaj de arboj, maldekstre monteto, dekstre valo, kie vidiĝas smaralda maro de fagoj kaj aliaj arboj.

Post longa supreniro, ĉe iu disvojiĝo komenciĝis la malsupreniro per la sama serpentuma vojo. Ĝis fine, ni atingis la deziritan lokon, tuj ni aranĝis la kelkhoran restadon sur la bordo de rivero VALEA RECE (Malvarma Valo).

Post minutoj granda fajro brulis tie kaj cirkaŭ de ĝi ni fritis kolbason, lardon per lignaj bastonetoj. Post la matenmanĝo ni trinkis tre bongustan mineralakvon, el fonto troviĝanta je 100 metra distanco.

La programo estis laŭ bontrovo de ĉiu. Tiel la plej multaj, laŭ la serpentuma pado sukcesis surgrimpiti la monteton, de kie al rigardo oni perspektivas la blua malproksimeco. Aliaj promenis tra arbaro admirante la belan violkoloran tapiŝon de kolĉikoj. Oni ludis societajn ludojn, oni promenis laŭ longe de la rivero, oni ludis eĉ futbalon, ĉar la vetero estis suna kaj favora por ĉio.

La aŭtuna naturo sur monto havas apartan ĉarmon, kiu allogas la atenton kaj admiron de la turistoj. La valo estis en ĝia plena florado de kolĉikoj, dronanta en ombroj kaj vegetaĵoj. La aero estis freŝa, pura kaj ni povis ĝui trankvile ĝian diecan ĉarmon.

Je la 14-a horo, laŭ nia interkonsento ĉiuj kolektiĝis kaj sekvis agrabla muzika programo. Muzikajn instrumentoj ni ne kunportis, sed voĉe ni kantis multajn kaj belajn Esperanto-kantojn. La momento fariĝis tiel solena, ŝajne ankaŭ la rivero kaj la arbaro silente aŭskultis nin, ili ne plu susuris.

Sed jen la tempo ŝtele forflugis kaj ni devis je la 16-a horo pretigi nian hejmvrevenon. Duonon antaŭ la dudeka horo ni troviĝis sur la loko, de kie ni matene ekiris. Do, antaŭ de nia lernejo sur kies pordego troviĝas firmao kun verda stelo, Esperante kaj rumane skribita la nomo de nia Asocio.

Ĉe ni Esperanto fortiĝis ankaŭ per io: en la biblioteko BUNYITAI VINCE, kiu troviĝas en la sama konstruaĵo kun la lernejo, mi donacis antaŭ nelonge, el mia biblioteko lernolibrojn, vortarojn, jurnalajn kaj revuojn, entute 730 pecojn kolektitaj de mi dum 25 jaroj, por pli bona diskonigo de Esperanto. Mi mencias tion, esperante, ke ankaŭ aliaj E-veteranoj trovos la ideon efika kaj ankaŭ ili aplikos favore al nobla Esperanto, kiu estas PACO KAJ AMIKECO INTER LA POPOLOJ!

PRI TRI VOJOJ, SOMERE 1997

Kiel agrable estas somere, kiam la suno brilas kaj varmigas nin ĉiujn kun siaj mildaj radioj kaj ne nur nin, same la tutan naturon!

Somere 1997 mi faris tri vojojn tre interesajn, tre ŝatatajn. La unuan mi faris en Pollando, en TORUN, kie mi ĉeestis ĉe Etnografia Muzeo, kie la direktoro de ĉi-tiu Muzeo organizis dum 12-15 junio 1997 Internacian Renkontiĝon de Popolaj Orkestroj, kun uzo de Esperanto, kiel pontlingvo. Ni, la rumana grupo, formita el 12 personoj, gajnis la unuan premion. Do, ni gajnis laŭdon, gloron kaj monon, admiron de la publiko. La plej interesa de ĉi-tiu etnografia renkontiĝo estis la spektaklo sur la stratoj de malnova Torun kaj antaŭ de malnovaj domoj en parko de Etnografia Muzeo. Krome la interrilato rekta al la publiko, al loĝantoj de Toruno, al la jurio, al la spektaklo, al ĉiuj aranĝoj kaj sukcesoj kulturaj.

Mia alia vojo estis en Somera Tendaro de Bicsad, Rumanio, kiun organizis profesoro de ĉi vilaĝa lernejo: Mihai TRIFOI. Ĝin partoprenis ankaŭ Ton el Nederlando, kiu havas tre efikan pedagogian metodon kaj stilon por instrui Esperanton al infanoj, precipe al etuloj. Reciproke, la infanoj tre ŝatis tian metodon de Ton kaj volonte vizitas la lecionojn siajn, same de Mihai TRIFOI kaj de mi mem, ĉar ankaŭ mi instruis Internacian Lingvon dum tiu somera tendaro 1997. La infanoj estas edukataj en amo de paco, de komprenemo kun aliaj infanoj de alia loko, aŭ lando, kontinento. Pro tio la lokaj familioj de infanoj gastigis la infanojn el aliaj lokoj, oni donis al ili ĉion.

La trian vojon mi faris en PECS Hungario, kie oni organizis Naturamikan Semajnon Esperanto, kun celo vivi kelkajn tagojn en ABALIGET, pitoreska naturloko, kun groto profunda, tre longa, tre malvarma, sed tre interesa por viziti, koni, scii pri strukturo geologia de nia Tero. Bonhumora estis la ekskurso en arbaro, apud montaro MECSEK, kie ni perdis la vojon, ni serĉis la alian, ŝajne bonan vojon, sed denove ni eraris. Ni revenis al alia vojo, ni reiris al la alia direkto kaj finfine ni trovis la bonan vojon por veturi al urbo PECS (SOPHANÆ = en latina lingvo).

Ĉiuj tri vojoj estis tre interesaj kaj neforgeseblaj, dank' al Dio, kiu protektas nin ĉiam!

Eugenia Speranta CORĂCIU, CLUJ NAPOCA

50-a IKUE KONGRESO

Por la 50-a IKUE Kongreso, kiu okazis en Italujo (en Romo kaj Rimini), kunvenis ĉirkaŭ 350 da kongresanoj el 21 landoj. Estis unu el la plej interesaj kongresoj, kiun mi partoprenis. Ĉeestis ne nur romkatolikoj, sed ankaŭ aliaj konfesianoj: ortodoksoj, reformacianoj, evangelianoj ktp.

Kunvenigis nin unue: la kredo je Dio, kaj due: nia komuna lingvo, kion oni uzis sukcese ĉe tagaj mesoj, prelegoj, aŭdienco ĉe Lia Papo Moŝto, kiu

parolis en Esperanto, kaj aŭdienco ĉe s-ro Oscar Luigi Scalfaro, kiu estas la Prezidanto de la Itala Respubliko.

La mirinda Italujo plenigis niajn animojn kun ekstazo kaj la Kongreso fariĝis neforgesebla.

Felicia ROMAN, ORADEA

TRAVIVAĴO EN LA KATOLIKA ESPERANTO TENDARO EN SEBRANICE

La 23-an de junio mi havis grandan ĝojon: mi ricevis la invitilon por K.E.T., krome ankaŭ tre ĝentilan leteron de s-ro ŠVACEK. (...)

En la tendaro ĉiu matene ni estis vekitaj per muziko kaj bela kanto. Post la matena preparado sekvis la Sankta Meso en la tendara Kapeleto. En la programo estis E-kurso, vespere tendarfajro. (...)

La 23-an de julio vizitis nian tendaron s-ro episkopo Josef HRANLICKA. Li estas tre ĉarma homo. Mi havis la bonŝancon paroli kun li. (...) La tendaron vizitis ankaŭ la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto Asocio. (...)

La 27-an de julio ni ekskursis. Perpiede ni vizitis la proksiman vilaĝon, kie ni vizitis la muelejon kaj la maljunan mueliston. La patro, la avo de la muelisto kaj li mem, en sia libera tempo okupiĝas pri muziko, pentraĵo, modelaĵo. La vizito estis tre interesa.

MONOSI Loránd, ORADEA

EKUMENA ESPERANTO TENDARO VILLINGEN SPECHTLOCH

Mi ekiris la 8-an de aŭgusto kun tri studentoj al la Ekumena Esperanta Tendaro, kiu okazis en Villingen, Germanio. (...)

En la tendaro la studentoj tre bone amuziĝis. En tiu tendaro partoprenis 70 studentoj el naŭ landoj. (...) Ni vojaĝis 1052 km-jn. (...)

Ĉi tiun belan vojaĝon ni devas danki al s-ro pastro Bernhard EICKORN, kiu invitis nin, kaj al niaj eksterlandaj E-ĝeamikoj, kiuj parte ankaŭ finance subtenis tion, kaj fine al nia lingvo Esperanto, kio en la Internacia Tendaro ebligis nian interkomprenadon.

FARKAS Antal, ORADEA

KARNAVALO DE FLOROJ

En Hungario ĉiu jare la 20-an de aŭgusto la tuta lando festas la tagon de Sankta Stefano, la unua kristana reĝo de la lando.

Tiu ĉi festo estas tre bela, ĉar en ĉiuj urboj oni organizas florkarnavalojn kaj vespere ofte okazas artfajraĵoj.

En la pasintaj jaroj kaj ankaŭ ĉi-jare mi havis okazon rigardi la ĝuplenan karnavalon de floroj en Debrecen.

La 20-an de aŭgusto matene regas soleneco en la tuta urbo. Ambaŭ flankoj de la stratoj estas plenaj kun homoj, kiuj senpacience atendas la komencon de karnavalo.

Unue defilis malnovaj aŭtoj, tiujn sekvis bele ornamita aŭto kun la blazono de Debrecen kaj la kvar senatanoj. Poste sekvis la ornamitaj aŭtoj de diversaj firmaoj.

La unuan premion gajnis "Yamata" japana aŭto. Yamata estas fraturbo de Debrecen.

La duan premion ricevis la Hotelo kaj Restoracio ORA TAŬRO. La aŭto figuris la fabelon Joĉjo kaj Julinjo.

La trian premion oni donis al BIOGAL, fabriko de medikamentoj el la urbo. Ĝi reprezentis la drakmortigantan Sanktan Georgon.

La firmao DAEWOO prezentigis per figuroj de du tigroj kaj la firmao MATAV per du gnomoj.

La aŭtoj estis tre bele ornamitaj per multkoloraj floroj kaj inter ili dancis diversaj grupoj.

Poste la karnavalo en la centro de la urbo finiĝis kaj daŭrigis en la stadiono, kie la spektantoj ĝuis la belan programon, inter kiuj troviĝis ankaŭ la belaj ĉevaljungaĵoj kaj vespere oni povis rigardi la admirindajn artfajraĵojn.

La festivalo tre agrable impresis min.

Eugenia-Ecaterina POPOVICIU, ORADEA

KIAM MI PARDONIS AL LA KATO?*

Neniam mi amis la katon. Mi havis 2-3 jarojn, kiam mi jam estis fotita kun etaj hundetoj. Mia patro estis amatora fotisto, kaj ege multajn fotojn li faris pri ni, infanoj. Sed eĉ unu foton mi ne havas kun katoj.

Kiu scias, kial, sed mi havis la opinion, ke la katoj ne estas sinceraj kaj honestaj bestoj. Mi ĉiam pensis, ke la hundo estas la plej fidela amiko de la homo.

Sed okazis io, kio ŝangis mian opinion. Antaŭ 42 jaroj mi feris unu monaton en la bela banloko BORSZEK. Tiu tempe mi suferis pri mia galo. Ĉiu tage mi trinkis el bonega akvofonto, kiu estis kuraca akvo kontraŭ galmalsano. Pasis du semajnoj, kiam mi havis la unuan rezulton. La rezulto estis tre malagrabla, ĉar la krizo alvenis neatendite. Post diversaj matenaj kuracmetodoj, mi devis kuŝi kaj ripozi ĉiu tage ĝis la tagmanĝo. Dum la ripozo alvenis la neatendita, rapida krizo. Subite neimageblan doloron mi eksentis. Eĉ centimetron mi ne povis moviĝi. Miaj ĉambraj koleginoj estis for kaj mi ne havis forton por preni medikamenton, vane ĝi estis apud mia lito, sur la tableto, kune kun la glaso da akvo. Mi kuŝis en la lito kaj suferegis.

Estis printempo. La aero estis freŝa kaj odorplena, ja ĉiuj printempaj

floroj bonege odoras. La suno brilas kaj ĉar la balkona pordo estis malfermita, estis aŭdebla ankaŭ la birdkoncerto. Ĉio estis belega, nur ke mi nenion povis ĝui, kuŝante en la lito kun neeltenebla doloro.

Tiam okazis la miraklo. Eĉ post jardekoj malfacile mi povas imagi, kiel la bestoj estas pli sentemaj ol multaj homoj.

Noktonigra kato aperis. Ĝi surgrimpis ĝis la etaĝo kaj eniris la ĉambron. Mole ĝi supren saltis mian liton, malrapide ĝi preter promenis mian senmoviĝantan korpon kaj ĝi haltis apud mia kapo. Ĝi sidiĝis apud mia ŝultro kaj sian kapon metis al mia kolo. Mallaŭte ĝi ekronronis. Senmove ĝi sidis tie.

Mi ekploris. Miaj larmoj ruliĝis sur mia vizaĝo, kelkaj eble sur ĝian pelton. Subite mi forte sentis, ke mi ne estas sola en la mondo kun mia dolorego. Kunsentema, kompatema estajo estas apud mi. Mola varmeco de la noktonigra kato varmigis mian koron. Ĝi helpis min elteni la neelteneblan. Mi perdis tiam mian tempo-senton, do, mi tute ne scias, kiom da minutoj pasis, ĝis kiam hejmen venis unu el la ĉambrokoleginoj. Ŝi mire rigardis min kaj la katon.

- Kial vi ploras? - ŝi demandis.

- Donu al mi la medikamenton, mi petas, kaj akvon - mi flustris al ŝi.

Poste la kato - kiel ĝi venis - tiel foriris. Neniam plu mi vidis ĝin. Ĝi ne estis la kato de la dommastrino, sed nek de la najbaroj. Eble ĝi estis anĝelete, kiu aperis en tiu noktonigra katoformo, ricevante la taskon: konsoli min.

Ekde tiam, tute aliel mi rigardas al ĉiuj katoj. Mi ne kredas plu, ke ili estas flatemaj, kiam ili karesas min per iliaj tutaj korpoj, sed forte mi sentas la amon, kio radias el ilia varma moleco.

Malgraŭ tiu sentoŝanĝo, mi neniam havis katon en mia propra loĝejo. Sed miaj genepoj ekhavis du. Unu nomiĝas KORMOS (FULGA), jam estas tri jara, bela, noktonigra kato. La alia estis CSIZMAS (BOTA), havante blankajn piedetojn, ĝi estis ege milda kateto, sed ĝi mortis. Kaj mi ploris, kiel la homoj ploras ĉe la morto de iu proksimulo.

Nome, intertempe, la genepoj havigis ankaŭ hundon. Komence ili estis bonegaj geamikoj, sed post unu jaro la hundo estis jam trioble pli granda kaj multoble pli forta ol la katoj. La ludo inter ili jam fariĝis lukto.

Mi ne scias, kio okazis dum unu nokto, sed matene ni trovis la mortan katon antaŭ la pordo de la domo.

Dum semajnoj mi sentis koleron kontraŭ la hundo. Mi ne karesis ĝin kaj mi salutis ĝin nur per "Bonan tagon".

Tempo pasis kaj ankaŭ mia kolero foriĝis. Ja la vivo ne haltas. La hundo nun havos idojn. La unuan fojon. Kaj ĝi, kaj ni estas feliĉaj.

Krome anstataŭ la morta kato ni havas novan kateton. Ĝia nomo estas TIGRIS (TIGRO), ĉar ĝi aspektas perfekte kaj absolute, kiel eta tigro. Tigris estas milda kontraŭ la homoj, sed la hundo - vane ĝi estas dudekoble pli granda ol la kato - timas lin!

Kiu komprenas la bestajn animojn?

SIGMOND Julia, CLUIJ-NAPOCA

*BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1997

Prozo: Dua premio : Julia SIGMOND (Rumanio)

ALOO

Ĉiu scias ja tiun ĉambroplanton kun dikaj sukoplenaj sed amaraj folioj. En la rusa lingvo oni nomas tiun planton centjarulo.

Antaŭ la rapidega evoluo de ĥemio, la homoj devis turni sin al plantoj por trovi ion kontraŭ malsanoj. Laŭ la ecoj de la planto, rimarkitaj dum la kuracado, oni donis la planto nomon. Verŝajne oni rimarkis, ke uzante aloon estas eble vivi ĝis alta aĝo sen koni malsanojn. Mi vere kredas ke homoj kontinue uzantaj aloon, povas vere vivi cent jarojn.

Estante laca, sufiĉas formanĝi 3-4-centrimetran foliopeceton, kaj via energio revenos dum kelkdek minutoj. Konstante uzante ĝian freŝan folion, ĉesas kronikaj malsanoj, la malpleniĝo de intesto fariĝas regula, rapide retiriĝas frostmalsanoj.

Multaj homoj timas ĝian amaran guston, sed aloajo en malgranda kvanto estas farebla kun mielo (1 parto da mielo, du partoj da aloo). Distranĉu (prefere per ligna tranĉilo) folion de aloo kaj miksu kun mielo. Kiam la mielo solviĝis, la miksaĵo estas uzebla. Dezirinde estas formanĝi ankaŭ la solidajon de aloo.

el SANIGA MENUO

de Kristina-Maria LUTTE

LA MASAI-OJ

La masai-oj estas loĝantoj de stepoj en Orienta Afriko. Ili apartenas al grupo de nilotaj popoloj. Ĉi-tiu tribo estas la plej karakteriza nomada bredista tribo inter la triboj de Orienta Afriko.

Ilia ĉefa okupo estas la bredado de ĝibaj bovoj (zebuoj), ili havas ankaŭ azenojn, kaprojn kaj ŝafojn. La viroj ankaŭ ĉasadas antilopojn kaj sovaĝajn bubalojn. La maldensaj fontoj kaj malgrasaj paŝtejoj devigas ilin - precipe en la seka sezono - kontante migri el unu loko al la alia loko kun siaj gregoj. Pro tio ili bezonas vastajn terenojn. Sed epidemioj povas neniigi iliajn bestojn. Tial ili kreis fortan, batalantan organizon, kiu povas konservi la paŝtejojn, eĉ ili organizas ekspediciojn kontraŭ la najbaraj triboj por forrabi iliajn bestojn.

Ilia socio dividiĝas en aĝgrupoj. La knaboj ĝis 12-14 jaraj, vivas ĉe la domaĉoj de siaj gepatroj, okupiĝas pri gardo kaj melko de bestoj. Poste, por ĉirkaŭ du jaroj, ili disiĝas de siaj gepatroj, vivas ekster la vilaĝoj, en arbustejoj. Tie ili ellernas la metodojn de ĉasado kaj batalo, la ritojn kaj tradiciojn de sia tribo. Tiu lernado komenciĝas per cirkumcido kaj finiĝas per raso de la kapo, kiam la 15-16-jara junulo iĝas batalanto (morano).

La batalanta aĝgrupo vivas sub severa milita disciplino, en apartaj vilaĝoj, kiuj ne estas ĉirkaŭbaritaj. Iliaj ĉefaj armiloj estas la longa lanĉo, la ŝirmilo farita el felo de bubalo, la longa glavo kaj la klabo farita el mola ligno aŭ korno de rinocero. En iliaj vilaĝoj vivas ankaŭ la needziniĝitaj junaj knabinoj. La batalantoj ne laboras, ili faras nur militajn ekzercojn, partoprenas al militaj ekspedicioj, kaj amuziĝas kun la knabinoj. Por la batalantoj estas malpermesita la konsumo de vegetalaj manĝaĵoj, ili povas manĝi nur lakton, viandon kaj la sangon de virbovoj. La masai-oj estis vestitaj kiel batalantoj, la aliaj triboj timis ilin. Sed venis la blankuloj, kiuj malpermesis militon. Tial la batalanto, por montri sian bravecon, komencis lukti kun leonoj. Li devis mortigi la leonon per sia lanĉo. Tiu batalanto, kiu povis venki ĉi-maniere la leonon, estas festata kiel heroo.

Alimaniere vivas la viroj, kiuj apartenas al la aĝgrupo de maljunuloj (ĉirkaŭ tiuj pliaĝaj ol tridek jaroj). Iliaj vilaĝoj estas ĉirkaŭbrakitaj, interne de la barilo enviciĝas la rondaj domaĉoj. Meze de la rondo de domaĉoj estas la loko de siaj bestoj. Kiam la viroj forlasas la aĝgrupon de la batalantoj, ili interŝanĝas siajn armilojn kun bovoj kaj edzinoj. Ili ŝanĝas ankaŭ siajn aspektojn. Ili boras siajn orelojn, alpendigas grandajn kupringojn en ili, lasas kreski siajn harojn, eltiras per tranĉilo sian suban incizivon kaj metas diversajn ornamaĵojn sur siaj brakoj. Ekde tiam ili rajtas manĝi ankaŭ vegetalajn manĝaĵojn. Ili estas la ĉefaj produktantoj, okupiĝas pri paŝto kaj melko de bestoj, iomete pri ĉasado kaj kultivado de banano. Ili partoprenas ja militajn ekspediciojn nur kiam estas necesa, aŭ laŭ siaj petoj. La estroj de tiuj vilaĝoj estas la magiistoj (leibonoj), sed ilia potenco estas limigita de la konsilio de la maljunuloj.

La knabinoj, poste la libera vivo kun batalantoj, per unu ceremonio fariĝas maturaj virinoj kaj edziniĝas kun viroj kiuj apartenas al aĝgrupo de maljunuloj. Ekde ĉi-tiu, ili povas surhavi en siaj oreloj, koloj, brakoj kaj piedoj metalajn braceletojn. Ili preparas la argilajn vazojn, alveninte en novan tendarejon ili konstruas la domaĉojn, faras la manĝaĵojn por viroj kaj geknaboj, prilaboras la felojn por vestaĵoj. Simile kun aliaj bredistaj triboj, la masai-oj ankaŭ lavas siajn havaĵojn kaj siajn proprajn korpojn per urino de bovinoj.

Iliaj armiloj estas preparataj de forĝistoj, kiuj konsistas unu fermitan, memstaran parton de la tribo. Ili edziĝas nur inter si por konservi la sekreton de la metio. Por siaj produktadoj ili ricevas bestojn aŭ lakton.

Ili kredas, ke komence la Tero estis malbela, malplena dezerto, en kiu vivis drako. Lutage malsuprenflugis el ĉielo la dio Ngai kaj venkis la monstron. La elfluanta sango de la drako fruktigis la teron kaj aperis vegetaĵo sur ĝi. La dio Ngai kreis la masai-ojn kaj li donis al ili la bestojn por travivi.

Nur la signifaj personoj estas entombigitaj, la kadavroj de simplaj homoj estas forportitaj ekster vilaĝon, kie la hienoj manĝas ilin. Ili kredas ke nur la magiistoj kaj la riĉaj, signifaj homoj vivas post la morto, kiel serpentoj.

La masai-oj ĝis nuntempe volis vivi kiel siaj praŭloj, malsimile de

aliaj triboj, ili rifuzis la ilojn de blankuloj kaj restis fiera kaj brava popolo.

SIMON Lászlo, ORADEA

ĜUSTIGO

Mi tre dankas pro la BAZARO. La "Diablo de la tipografio" faris unu frazon nekomprenebla en mia antaŭa mesaĝo. Mi ne scias precize, kion mi skribis, sed kvazaŭ ĝi estis tiel: "Nun, kiam vi komencas esperantigi - tre malfrue - ni, kiuj komencis ĝin jam en komunismo, preskaŭ forgesis ĝin, bedaŭrinde, pro nepraktiko."

SZÉKELY Attila, TÂRGU MURES

Pro la eraro, vian pardonon petas la redakcio.

En la enigmo de la pasinta numero troviĝas eraro. La frazo 7. estas la jena: "La najbaro de tiu, kiu havas rozon, havas vulpon kaj la alia najbaro ŝatas veturi". Ni petas vian pardonon kaj atendas viajn solvojn ĝis la 1-a de februaro. Vi ne forgesu, ke inter la solvantoj ni lotumos premiojn!

OPINIOJ, KONSILAJ, KRITIKOJ, PROPONOJ

Elkore mi dankas por la revuo BAZARO. Mi legis kaj rimarkis, ke ĝi pliboniĝis. Kune kun la E-kunlaborantoj el la tuta lando, BAZARO iĝas la plej bona kaj interesa revuo el nia lando. Laŭ mia opinio la enhavo povos iĝi pli interesa, se estos kelkaj interesaj temoj, ekz. turismo en nia lando, anekdotoj, ludoj aŭ pri la maniero, kiel travivas diversaj homoj la plej interesan, la plej "longan nokton". Estus bone, se ni, samideanoj, povus organizi jarfinan vesperon.

Adina MOISE, CONSTANTA

La senditan BAZARO'n mi legis kun vera plezuro. Estas grave kaj necese por via nacia movado, ke vi posedu kontakte. Kuraĝige por vi estis, ke venis tiom da pozitivaj reagoj. Daŭrigu kaj persistu. Plaĉis al mi via ĉefartikolo pri GRAZ.

Jacques TUINDER, NEDERLANDO

Mi ĝojus, se vi akceptus antaŭpagon por pluraj eldonoj, ekzemple por kvin ekzempleroj sinsekvaj.

VAJDA Ioan, BRASOV

Denove dankon pro la BAZARO kaj gratulon pro via persisteco! Mia deziro estas, ke ekde nun, impliki pli en la E-movado, precipe junulara, en nia lando. Do, BAZARO, estas vera necesego por mi. Mi esperas, ke en la venonta numero mi legos ion pri la 2-a Nacia E-Kongreso de Rumeja, kie mi ne povis partopreni pro la armeo. En la futuro mi esperas ne nur aboni, sed ankaŭ kunlabori por la BAZARO. ĈION BONAN!

Ovidiu GORDEA, BRASOV

Mi ŝatus ekscii, kiel oni povas abonigi por BAZARO la eksterlandaj geesperantistoj. Ĉu ili povas rekte abonigi, aŭ ĉu mi povas pagi anstataŭ ili. Kaj kiom da lejoj estus ekzemple por Usono? SIMON Lászlo, ORADEA

Koran dankon por la bone redaktitaj numeroj de la revuo BAZARO! Ŝajnas al mi, ke vi estas fervoraj geesperantistoj en Rumanio. Vi havas ankaŭ bonajn esperantistojn inter la kuracistoj. Surprizas min, ke tiom multaj kiel 1000 partoprenis la Ekumenan Kongreson en Graz. Kostis multe. Kiom multaj el Svedio partoprenis? Eble 100. Kaj el tiuj nur unu esperantistino. La intereso por Esperanto malkreskis en Svedio. Iu el Rumanio devas instigi nin. Antaŭ multaj jaroj Tiberiu MORARIU veturis al Svedio kaj instruis Esperanton. Albu Vasile el Sibiu lernis Esperanton de li. Bedaŭrinde li tro frue mortis.

Arne LUNDKVIST, NORVEGIO

Unue mi volas gratuli al Esperanto Gazeto BAZARO. Mi ricevis ĉiujn numerojn kaj kun granda intereso mi finlegis ilin. Estis ĝojo por mi malkovri unu - du konatajn nomojn, kiel ekz. Dr.LAZAR el COVASNA.

Multe da laboro estas enmetita, sed meritis labori, ĉar la nombro de la legantaro konstante kreskas kaj ankaŭ la eksterlandaj geesperantistoj interesiĝas pri ĝi. Tiu instigu la redaktorojn. Mi estas certa, ke post iom da tempo ankaŭ la ekstera parto plibeliĝos, kaj la enhavo pliriĉiĝos. Kaj espereble ankaŭ la financaj rimedoj estos disponeblaj.

KOCZIÁN-SZABÓ Rozália, GERMANIO

Mi legis kun intereso BAZARO'n kaj mi tre ĝojas, ke ni havas eblecon havi Esperantlingvan Revuon.

MONOSI Loránd, ORADEA

Kara BAZARO! Mi legis la duan numeron kaj sincere mi trovis ĝin tre interesa. E-eventoj, lokaj kaj internaciaj, pensoj kaj agadoj de esperantistoj rumanaj kaj ne nur. Vi certe progresos kaj atingos sukceson. Via laboro estas memkompreneble malfacila, sed vi certe komprenas, ke vi estas E-pioniroj, pro tio via BAZARO estas ege valora por ESPERANTO. Do, daŭru esti la spegulo de E-movado en Rumanio! Sukceson! Kaj Feliĉan Novjaron!

Alex. ALMASAN, CLUJ NAPOCA

Kun ĝojo ni vidas, ke nia revuo plaĉas al nia legantaro, ke vi opinias, ke ĝia enhavo konstante pliboniĝas. Kiam ni jam multfoje diris, ni faras ĉion eblan laŭ niaj povoj, ke la enhavo kaj ankaŭ la aspekto de nia revuo pliboniĝu respektive plibeliĝu, sed ankoraŭ grandaj obstakloj staras antaŭ ni, ke ni atingu la idealan grandecon kaj belecon de BAZARO. Ankoraŭ senpage ni faras ĉian laboron, kiu koncernas la verkadon kaj eldonadon, sed espereble post kelkaj jaroj, BAZARO fariĝos vera, profita E-revuo, kiun redaktos profesia teamo. Tio dependas grandparte de vi, t.e. de nia legantaro, kies nombro se superos almenaŭ 1000 opojn, tiam ni jam povos paroli pri tio. Ni esperas je tio, ĉar nur post unu jara vivo de BAZARO, ĝi jam estas vaste konata en Rumanio kaj eĉ

eksterlande.

Responde je viaj demandoj koncerne la abonrimedon de eksterlandanoj, ni diras ke ĉiu Esperantisto kiu deziras aboni je BAZARO povas fari tion, simple sendante al ni unu IRK (Internacia Respondo Kupono) aŭ egalvaloron en valuto aŭ leoj, por unu ekzemplero. Bedaŭrinde ni ne povas peti la abonon por la tuta jaro, ĉar la financa situacio en Rumanio estas malstabila kaj ni ne scias je kio kalkulu post kelkaj monatoj.

Laŭ la opinio de s-ino Adina MOISE, ni proponas al vi, ke tre mallonge rakontu al ni kiel vi travivis la plej interesan, la plej "longan nokton".

En la venonta numero ni aperigos ankaŭ rubrikon pri turismaj interesajoj de Rumanio. Rilate tion, ni atendas ankaŭ viajn helpojn. Do sendu al ni interesajojn pri via regiono.

Bedaŭrinde en ĉi-tiu numero ankoraŭ vi povas legi nenion pri la 2-a Kongreso de Rum EJA, ĉar ĝis nun ni ne ricevis raporton de la partoprenantoj (el CLUJ neniu partoprenis ĝin). Per tiu vojo denove ni petas la partoprenintojn de tiu kongreso, ke informu nin pri la okazintaĵoj.

Denove ni rimarkas kun granda malĝojo, ke la Esperantistoj el TIMISOARA (kie troviĝas la sidejo de REA kaj RumEJA) kaj BUKARESTO, eĉ unu abonon ni ne ricevis. Estas nekompreneble, ke en tiuj du gravaj centroj de Rumania E-movado neniu interesiĝas (eĉ malbonan opinionon ne havas) pri BAZARO!?

Dankegon pro via anima apogo, kiun vi donas al ni per viaj leteroj, kaj esperante je baldaŭa renkontiĝo en 1998, la redakcio de BAZARO deziras al ĉiuj legantoj **FELIĈAN NOVAN JARON!**

NOVAĴOJ

Laste aperis en la zorgo de Eldonejo DOKIA du libroj:

Alti pasi în Esperanto de Ionel ONET, 6^o paĝa, formato A5, kiu enhavas Rumana - Esperanto vortaron, E-gramatikon, Rumanajn toponimojn en Esperanto kaj Rumanan Esperantistan Bibliografion. Prezo: 8000 leoj+sendokostoj.

Documente Esperanto de Ionel ONET kaj Sasha VLAD, en rumana lingvo, 38 paĝa formata A5, antologio dediĉita al 110 jariĝo de lingvo Esperanto kaj al la 80-a datreveno de la morto de Zamenhof. Prezo 4000 leoj+sendokostoj.

Ambaŭ libroj estas mendeblaj per ramburso ĉe *Radu CRETU str. Padin 28/19, RO-3400, CLUJ-NAPOCA, RUMANIO*

ESPERANTO UZATA EN FILMO

La 24-an de oktobro premieris la holivuda scienc-fikcia filmo *Gattaca*, verkita kaj reĝisorita de Andrew Niccol. La intrigo: En socio de genetike planitaj homoj la nature naskita Jerome (Ethan Hawke) ŝajnigas sin membro de

la genetika elito por partopreni spacvojaĝon. Tamen, unu semajnon antaŭ la misio leviĝas duboj pri lia origino, kaj eĉ la koleginino al kiu li enamiĝis (Uma Thurman) eksuspektas pri lia trompo.

Dank' al perado de la kontrolisto de vid-efektoj, Chriss Watts, la filmo, produktita de Columbia Pictures, uzas Esperanton en iuj dialogoj: nia lingvo sonas precipe per la laŭtparoliloj en la halegoj de la Gattaca Aerkosma Korporacio, kun la imponaj voĉoj de Marisa John kaj de Miko Sloper, oficisto de Esperanto-Logo por Norda Ameriko. el revuo Esperanto, n-ro1096

E-NOVAĴAGENTEJO UNUJARA

La 25-an de aŭgusto laŭkutime ĉ. 90 homoj ricevis retmesaĝon de "Interredaktore" (<eventoj@hungary.net>). Tamen nekutiman pro sia temo: la unujariĝo de "Interredaktore" mem servo ekfunkciinta la 14-an de aŭgusto 1996. De post tiam la redaktoroj de Eventoj preskaŭ ĉiu tage dissendis al la redaktoroj de aliaj E-periodaĵoj kaj al estraranoj de UEA kaj TEJO por aperigo aŭ por informo movadajn novaĵojn kaj artikolojn: ĝis la 22-a de septembro 1997 entute 437 mesaĝojn. La "Interredaktore estas la plej ofta (preskaŭ ĉiutaga) movada informilo, kiu funkcias kvazaŭ E-Novajagentejo.

El revuo ESPERANTO, n-ro1096

NOVAĴOJ EL BICSAD

Inter la 14-a kaj la 23-a de julio de la kuranta jaro, okazis en nia lernejo la unuaj someraj kursoj kadre de la Interlerneja Tendaro ESPERANTO kaj INFORMATIKO. La ĉefa celo estis enkonduki la infanojn en la studadon de ILo kaj de informatiko, kaj tiel helpi la vilaĝajn lernejojn alproksimiĝi je la nuntempa progreso. Partoprenis la kursojn gelemnantojn el 5 vilaĝoj kaj 2 urboj. El la urbo Turda alvenis grupon de 4 gelemnantoj kun 2 instruistinoj. La grupon gvidis s-ino Eugenia Speranta CORĂCIU, kiu partoprenis aktive je la instruado. Por la unua fojo renkontiĝis en Bicsad 3 E-geinstruistoj: Ton VERWOERD el Nederlando, Eugenia Speranta CORĂCIU el Turda kaj Mihai TRIFOI el Bicsad, por kune ili instru Esperanton al infanoj (45) inter 6 kaj 16 jaraĵoj. Dum la lastaj tagoj de la kursoj ĉeestis ankaŭ du belgaj geinstruistoj/esperantistoj Dominique kaj Jean-Claude THUMERELLE, tiel ke nia grupo de Esperanto-instruistoj forte impresis la ĉeestantojn. La prestiĝo de Esperanto kreskis kaj disvastiĝis en la ĉirkaŭaĵoj: tiu estis alia antaŭ proponita celo, kiun ni sukcese atingis. Ĉar detaloj pri nia aĝo aperos en aliaj revuoj, mi volas nur akcenti la efekton, ke nia komuna laboro donis bonajn rezultojn.

En Bicsad, ni daŭrigos la agadon ankaŭ dum la nova instruaro 1997/1998. Nia sekvonta paŝo estos la partopreno dum la Pasko 1998 la Esperanto Renkontiĝon ce Kastelo Gresillon, en Francio. Pro tio, ni devas bone pretiĝi la ses gelemnantojn kun kiuj mi vojaĝos tien. Mia celo perfektigi kelkajn gelemnantojn realiĝas paŝo post paŝo. Ni dankas al ĉiuj gesamideanoj kiuj subtenas nian lokan agadon.

Mihai TRIFOI, BICSAD

TAGO DE ESPERANTO LIBRO

La 12-an de decembro 1997, vendrede je la 17-a horo ASOCIO de ESPERANTO CLUJ kunvenigas siajn membojn, geesperantistojn kaj ĉiujn interesiĝantojn, por festi la Tagon de E-Libro kaj la naskiĝtagon de L. L. Zamenhof, la kreatoro de Internacia Lingvo Esperanto, en *Municipa Kulturdomo de Cluj-Napoca (p-ta Unirii 24)*., kadre de kiu, vi havas la okazon spekti dokumentan filmon pri la Interlerneja Tendaro ESPERANTO KAJ INFORMATIKO okazinta inter 14-23 de julio 1997 en Bicsad. Dum la renkontiĝo estos prezentataj la ĵus eldonitaj du libroj fare de Eldonejo DOKIA, nome *Alti pasi ĉi Esperanto*: de Ionel ONET (kiu enhavas Rumana - Esperanto vortaron, E-gramatikon, Rumanajn toponimojn en Esperanto kaj Rumanan Esperantistan Bibliografion) kaj *Documente Esperanto* de Ionel ONET kaj Sasha VLAD (en rumana lingvo, 38 paĝa formata A5, antologio dediĉita al 110 jariĝo de lingvo Esperanto kaj al la 80-a datreveno de la morto de Zamenhof).

SEZONA NACIA FERVOJISTA RENKONTIĜO, 14-16 novembro 1997.

Vendrede, la 14-an de novembro okazis la Interkona Vespero en la urbo CLUJ. Venis pli ol 50 esperantistoj el la tuta lando. En gaja etoso ni komencis la renkontiĝon.

Sabate okazis la faka laboro, la diskutoj kaj debatoj, poste okazis ekskurso.

Dimanĉe okazis la adiaŭa renkontiĝo.

La partoprenantoj interesiĝis pri nia BAZARO, eĉ kelkaj donis monon por abono.

DODO, CLUJ NAPOCA

ATENTU! La adreso de *LÁSZLÓ Mária* ŝanĝiĝis. La nova adreso: str. Vlad Tepes 3/4 4800 BAIJA MARE aŭ C.P.546.

ESPERANTISTA RIPOZRETO

Se vi ŝatus foje ripozi en aliaj regionoj de la mondo, se vi rekompence volonte akceptus esperantistojn en via ripozdomo aŭ loĝejo, aliĝu al "Esperantista ripozreto".

Pliaj infomoj ĉe **Vojaĝoficejo ESPERTUR**, H-1136 BUDAPEST, Tátra u. 4., Tel.: +36-1-2680306, +36-1-3334343, Faksilo: +36-1-2680331
Internet: esperantohea@mail.c3.hu

Ni dankas al niaj subtenantoj, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin. Ni dankas al:
s-ino VITÁLYOS Mária, Germanio, kiu donacis 500 DM
s-ro Arne LUNDKVIST, Norvegio, kiu donacis 20 SEK
N.N., kiu donacis 500 da paperfolioj
MUNICIPA KULTURDOMO kaj s-ro Claudiu BANDICI, ĉar ebligis al ni redakti la 3-an numeron de BAZARO.

ARANĜOJ EN ESPERANTUJO

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTAJ ĜEMELKLUBOJ

1-6 majo 1998 TATA Hungario

Partoprenkotizo: ĉ. 16000 HUF (ĉ. 160 NGL; ĉ. 500 FRF)

La partoprenkotizo inkluzivas la tranoktadon ĉe esperantistoj, manĝojn, ekskursojn (al Pannonhalma, Budapeŝto, Győr kaj Majk)

Pliaj informoj haveblas ĉe : Miny Massar

Ilpenwaar 92, NL-1824 C.G. Alkmaar, Nederlando

Tel: +31 72 56 12 668

BUDAPESTA SILVESTRO

29 decembro 1997-2 januaro 1998, BUDAPESTO, HUNGARIO

Partoprenkotizo: 160 USD en dustelaj hoteloj, 110 USD en turista kategorio
(3-4 litaj ĉambroj)

Aliĝu ĉe: **Vojaĝoficejo ESPERTUR**, H-1136 BUDAPEST, Tátra u. 4.,

Tel.: +36-1-2680306, +36-1-3334343, Faksilo: +36-1-2680331

Internet: esperantohea@mail.c3.hu

39-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-SKISEMAJNO

7-14 februaro 1998, MARIBOR, SLOVENIO

Bona skiado sur natura aŭ artefarita neĝo de la 9-a matene ĝis 21-a vespere, nokta skiado, taŭgaj hotelprezoj (40-50 DEM tago/persono, inkl. tranokton maten-, kaj vespermanĝon).

Informoj ĉe: pf.825 SI-2001 MARIBOR, SLOVENIO

VOJAĜO AL 83-a U.K., MONTPELLIER, FRANCO

31 julio-9 aŭgusto 1998, laŭ la vojo Budapeŝto-Graz-Klagenfurt-Villach-Udine-Mestre-Genova-San Remo-Monaco-Cannes-Montpellier-Torino-Milano-Verona-Venecio-Graz-Budapeŝto

Partoprenkotizo proksimume: 65.000 HUF (Vojaĝkostoj, loĝado, asekuro)

Aliĝu ĉe: **Vojaĝoficejo ESPERTUR**

HUNGARIA ESPERANTISTA SEMAJNO

4-10 oktobro 1998, Orienta kaj Suda Hungario

Vizito al famaj vinberĝardenoj de Okcidenta kaj Suda Hungario, regiono de Balatono, Szekszárd, Villány, partopreni en la vinberokolektado kaj vinproduktado. Vizito al subĉiela varmakva kuracbanejo Hévíz.

Partoprenkotizo: kun plena pensio 530 NGL en dulitaj ĉambroj de dustelaj hoteloj, 330 NGL en turista kategorio (3-4 litaj ĉambroj).

Aliĝu ĉe: **Vojaĝoficejo ESPERTUR**

ŜERCO

Afabla instruisto

-Nia instruisto estas vere afabla homo, nur ŝajnas, ke li scias malmulton.

-Kial vi pensa ĉi-tion?

-Ĉar li ĉion demandas de ni.

sendita de SIMON László

Senpatrine

Knabeto plorante iras al la kasistino de iu granda vendejo, ĉar li perdis siajn gepatrojn. La kasistino akompanas lin, kaj ĉe la komenco de ĉiu bretokolono levas lin, demandante: "Ĉu vi vidas vian patrinon?" La knabo nur kapneas, sed la trian fojon ekparolas: "Ne, mi ĉiam vidas nur mian patron"

KORESPONDI DEZIRAS

s-ro Ionel BODALE, Calea Obcinelor 3, Bl.3bis, ap.22, RO-5800 SUCEAVA

KONKURSO

Al ĉiuj kiuj ĝuste respondos al ĉiuj demandoj, oni sendas E-librojn kiel premion. La respondojn sendu al

Ionel ONET, P.O.Box 13492.Berkeley CA 94712.USA

1. Kiu kompilis la unuan E-vortareton por rumanoj kaj kiam ĝi aperis?
2. En kiu rumania urbo fondiĝis la unua E-organizo kaj kiam?
3. Kiam kaj kie aperis la unua dudirekta vortaro E-rumana/rumana-E?
4. Kiuj estas la du mondfamaj rumanid... naj esperantistoj kies Esperanta vivo ligiĝas al Cluj/Kolozsvár?
5. Kiel titoliĝas la impona libro pri la persekutoj kontraŭ Esperanto kaj kiu ĝin aŭtoris?

FUNDAMENTA KRESTOMATIO DE LA LINGVO ESPERANTO de D-ro L. L. ZAMENHOF

§10.(Ekzercaro, §18)

Mi havas cent pomojn. - Mi havas centoj de pomoj. - Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj. - Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduoj da forkoj - Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron. - Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam bezonus monon. - Por ĉiu tago

mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t.e. (tio estas) dek frankojn. - Kvinoble sep estas tridek kvin. - Tri estas duono de ses. - Ok estas kvar kvinonoj de dek. - Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj). - Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro. - Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope. - Kvinope ili sin jetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn. - Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj. - Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.

§11.(Ekzercaro, §19)

La feino. (Daŭrigo)

En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi drinki. "Tre volonte, mia bona", diris la bela knabino. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino: "Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon" (ĉar tiu ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino). "Mi faras al vi donacon", daŭrigis la feino, "ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono".

§12.(Ekzercaro, §20)

Mi legas. - Ci skribas (anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi"). - Li estas knabo kaj ŝi estas knabino. - Ni estas homoj. - Vi estas infanoj. - Ili estas rusoj. - Kie estas la knaboj? - Ili estas en la ĝardeno. - Kie estas la Knabinoj? - Ili ankaŭ estas en la ĝardeno. - Kie estas la tranĉiloj? - Ili kuŝas sur la tablo. - Mi vokas la knabon, kaj li venas. - Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas. - La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi. - La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi. - Knabo, vi estas neĝentilaj. - Sinjoro, vi estas neĝentila. - Sinjoroj, Vi estas neĝentilaj. - Mia hundo, vi estas tre fidela. - Oni diras, ke la vero ĉiam venkas. - En la vintro Oni hejtas la fornojn. - Kiam Oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn.

§13.(Ekzercaro, §21)

La feino. (Daŭrigo)

Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. "Pardonu al mi, patrino", diris la malfeliĉa knabino, "Ke mi restis tiel longe". Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj grandaj diamantoj.

La vintro venas

La vintro venas,
ekstere neĝas,
kaj ĉiu infano
ĝojigas.

Ili ĝoje ludas,
viglas kaj krias,
la neĝo senĉese
nur falas.

Fariĝas vespero,
neniu ekstere,
el inter infanoj
troviĝas.

En ĉiuj fenestroj,
estas botetoj,
la Paĉjo-Kristnaskon
atendas.
Nagy Iren

La lingvo por ni

Sur montoj kaj step'indianoj
Ĉasadas kun ruĝfamili',
Kaj se vi postulas parolon
El kanjon' eliras la kri':

ESPERANTO ESTAS LA LINGVO
POR NI, POR NI!
ESPERANTO ESTAS LA LINGVO
POR NI, POR MI!

En densa afrika ĝangalo
Sovaĝaj nigruloj sen di'
Jam solvis la lingvan problemon,
per tam' tam' eliras la kri'...

Ĉe norda poluso eskimoj
Loĝadas en neĝo-glaci'
Se ili bezonas parolon
Aŭdigas la tutsama kri'...

Sur tuta la vasta terglobo
En arboj kaj teritori'
Troviĝas samidecanaro
Kaj sonas de buboj la kri'...

Indianoj, rigruloj, eskimoj,
Urbanoj kaj buboj kaj mi
Jam uzas la Zamenhof lingvon,
Do, vivu, prosperu la kri'...

ĜIS LA PROKSIMA NUMERO!

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendadas la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

FELIĈAN NOVAN JARON!

ASOCIO de ESPERANTO
C.P. 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO

IMPRIMATE



al PAPP TIBOR
TROMBITA'S u. Nr
4031 DEBREEN
UNGA-RIA